

# Didakĥeo

aŭ Instruo de la dek du Apostoloj

El la Greka tradukita de Gerrit Isai Berveling 1979

# *Enkonduke<sup>1</sup> al Didaĥeo*

*Didaĥeo* aŭ Instruo de la dek du Apostoloj unuafoje estis aperigita en 1883.

Laŭ la titolo, oni eble atendus, ke ĝi enhavu la evangelian predikadon de Jesuo, sed je iom pli atenta legado de la teksto oni rapide konsciigas, ke temas pri tute alia enhavo: fakte ĝi estas, por tiel diri, kompendio pri eklezia vivo: enestas moralaj preskriboj kaj priorganizaj kaj liturgiaj reguloj.

Kiutempe *Didaĥeo* estis verkita, ne certas.

Kelkaj aŭtoroj (ekzemple Audet) dubas inter 50 kaj 70 p. K., aliaj supozas ke iom pli poste, oni diru ĉ. 90 p. K.

Antaŭ nelonge proponis eĉ ankoraŭ pli fruan daton la fama anglikana John A. T. Robinson: antaŭ 50 p. K. Sed kiel ajn, ĝi certe devenas el tempo, kiam ankoraŭ sufiĉe granda parto de l' Nova Testamento ankoraŭ ne estis verkita (pseŭdopaŭlaj leteroj, Apokalipso, kelkaj evangelioj ...).

*Didaĥeo* ĝuis antikve grandan respekton: en kelkaj lokaj eklezioj ĝi longe estis konsiderata inter la «oficialaj» libroj de l' Nova Testamento, sed post sufiĉe forta atako de ekzemple Eŭsebio (Hist. Ekl.), Atanasio kaj Rufino, ĝi pli kaj pli foriĝis inter la apokrifajn (*Apokrifa* laŭlitere signifas *Kaŝita*). Se mi bone memoras, Origeno Aleksandria konsideris ĝin kanona. Laŭ informo de Atanzio, ĝi estis liatempe uzata por instrui novkonvertitojn. Certas, ke ĝi ofte servis kiel modelo al postaj ekleziaj liturgioj kaj kanonjuraj regularoj.

Kiel jam dirite, ne certas, ĉu dum verkiĝo de l' *Didaĥeo* jam ekzistis skribe la Evangelio aŭ ne. Tamen, kompreneble, la tradicio, el kiu poste ili kondensiĝis, jam estis vive uzata en la praeklezio: ĉie oni konis «*Vortojn*

---

<sup>1</sup> El la eldono de IABO, Ravenna, 1979. Estis mia unua presita traduko en Esperanto.

*de l' Sinjoro*», ĉie konataj estis en la lokaj eklezioj la rakontoj pri liaj faroj kaj paroloj. Ne nur en la Evangelio oni renkontas t. n. Vortojn de l' Sinjoro, sed ankaŭ ĉe Paŭlo, ankaŭ en la *Didaĥeo* (vidu: 1:6 – ŝvitu via almozo en viaj manoj ĝis vi scias, al kiu doni, t. e. vi tre bone pripensu antaŭe, kiu ĝin bezonas: laŭ la ĉirkaŭteksto ĉi tio devas prezenti Vorton de l' Sinjoro), kaj eĉ multe pli poste ankaŭ en Korano oni trovas eldirojn, kiuj tie estas citataj kiel Vortoj de Jesuo.

Atente legante la *Didaĥeon* oni preskaŭ daŭre renkontas citojn aŭ preskaŭcitojn el la Biblio, ĉu Malnova Testamento ĉu Nova Testamento. Parte ili estas ne vere citoj sed nur pruvoj pri tio, ke jam buŝe ekzistis tiuj Vortoj. (Vidu ekzemple la tekston de l' Patronia).

Gerrit Isai Berveling

## *Broŝure:*

La Didaĥeo

Instruo de la Dekdu Apostoloj

El la helena trad. Gerrit Berveling

Serio de I.A.B.O. 4

IABO-Eldonejo, Ravenna 1979

Didaĥeo aŭ Instruo de la dek du Apostoloj

El la Greka tradukita de Gerrit Isai Berveling 1979

Voĉoj Kristanaj 33

VoKo, Rijswijk 2020 (planita)

## *Interrete:*

### *La originala Greka teksto:*

<https://www.ccel.org/ccel/lake/fathers2.v.html>

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/didache.htm>

<https://bkv.unifr.ch/works/2/versions/4/divisions>

[https://www.hs-augsburg.de/~harsch/graeca/  
Chronologia/S\\_post02/Didache/did\\_text.html](https://www.hs-augsburg.de/~harsch/graeca/Chronologia/S_post02/Didache/did_text.html)

### *Germane kaj Greke:*

<https://kreuzgang.org/pdf/didache.pdf>

*Lastfoje kontrolitaj: 2020-04-21. La retpaĝoj de [www.ccel.org](http://www.ccel.org) ne ĉiam alireblas.*

# *Didacheo aŭ Instruo de l' Sinjoro tra la dek du apostoloj al la popoloj*

*Διδαχὴ κυρίου*

*διὰ τῶν δώδεκα ἀποστόλων τοῖς ἔθνεσιν*

**1** <sup>1</sup><sup>2</sup> Du vojoj ekzistas: unu de la vivo kaj unu de la morto; granda estas la diferenco inter la du vojoj. 2 La vojo de la vivo, do, estas jena: Unue amu Dion, farinton vian, due vian proksimulon kiel vin mem; kaj ĉion, kion vi ne deziras, ke ĝi okazu al vi, vi ne faru al aliulo. 3 De tiuj ĉi paroloj la instruo estas jena: Benu la malbenantojn viajn kaj preĝu por viaj malamikoj, fastu por viaj persekutantoj. Kia ja estas via merito, se vi amas ilin, kiuj vin amas? ĉu ne ankaŭ la popoloj tion faras? sed vi tiujn amu, kiuj malamas vin – kaj tiam vi ne havos malamikon. 4 Abstinu de karnaj (kaj korpaj) deziroj. Se iu donas al vi orefracojn sur la dekstran vangon, turnu al li ankaŭ la alian kaj vi estos perfekta; se iu prenas vian mantelon, donu al li ankaŭ la tunikon; se iu forprenas de vi viaĵon, ne re-petu ĝin; vi ja ne povas. 5 Al ĉiu petanto donu kaj ne re-petu; ĉar la Patro volas, ke oni donu al ĉiuj el siaj bonoj. Feliĉa la donanto laŭ la ordono; li ja estas senkulpa. Sed ve al la ricevanto, ĉar se bezonulo ricevas, li ja estos senkulpa; se sen bezono, li devos klarigi, por kio kaj pro kio li ricevis. Enkarcerigite, li estos esplordemandata pri tio, kion li faris, kaj li ne eliros el tie ĝis li estos repaginta la lastan kvadranton. 6 Sed ankaŭ pri tio estis dirite: ŝvitu via almozo en viaj manoj ĝis vi scias, al kiu doni.

---

<sup>2</sup> Ĉapitroj 1 ĝis 4 montras la Vojon de la Vivo; Ĉapitro 5 la Vojon de la Morto. Ĉap. 6 donas rean admonon pri la Vojo de la Instruo.

**2** 1 Dua ordono de l' instruo: 2 Ne mortigu, ne adultu, ne koruptu infanojn, ne malĉastu, ne ŝtelu, ne magiadu, ne sorĉumu, ne mortigu infanon abortige nek naskiton mortigu, 3 ne deziru la aĵojn de la proksimulo, ne false ĵuru, ne mis-atestu, ne kalumniu, ne rankoru, 4 ne estu dumensa nek dulanga; ĉar kaptilo de la morto estas la dulangeco. 5 Via parolo ne estu mensoga nek malplena, sed plenumiĝu per ago. 6 Vi ne estu akaparema nek avara nek hipokrita nek malica nek fierega. Ne koncipu aĉan intencon al via proksimulo. 7 Ne malamuzu iun ajn, sed kelkajn refutu, pro aliaj preĝu, ree aliajn amu pli ol vian vivon.

**3** 1 Infano mia, fuĝu for de ĉiu malbono kaj de ĉio al ĝi simila. 2 Ne estu kolerema ĉar la kolero kondukas al la murdo, nek ĵaluza nek malpacema nek impeta: ĉar el ĉio tio estiĝas la murdoj. 3 Infano mia, ne fariĝu avara, ĉar la avareco kondukas al malĉasteco, nek diboĉa nek altokula: ĉar el ĉio tio estiĝas malĉastecoj. 4 Infano mia, ne fariĝu birdaŭguristo, ĉar tio kondukas al la idolkulto, nek sorĉkantanto nek astrologo nek ĉirkaŭpuriganto, nek deziru tion vidi (nek aŭdi); ĉar el ĉio tio estiĝas idolkulto. 5 Infano mia, ne fariĝu mensogulo, ĉar la mensogo kondukas al la ŝtelo, nek mon-amiko nek vantaĵulo: ĉar el ĉio tio estiĝas la ŝteloj. 6 Infano mia, ne fariĝu grumblema ĉar el ĉio tio estiĝas blasfemoj. 7 Estu milda, ĉar la mildaj heredoj la landon. 8 Fariĝu grandanima kaj kompatema kaj senmalica kaj trankvila kaj bona kaj ĉiam timu la parolojn, kiujn vi aŭdis. 9 Ne altigu vin mem nek donu al via animo trokuraĝon. Ne gluiĝu via animo meze de l' orgojlaj, sed meze de l' justaj kaj humilaj ĝi loĝu. 10 La okazaĵojn, kiuj vin trafas, vi akceptu kiel bonajn, sciante, ke ekster Dio okazas ja nenio.

**4** 1 Infano mia, memoru lin, kiu diras la parolon de Dio al vi nokte kaj tage, kaj honoru lin kiel sinjoron: de kie ja parolas la sinjoreco, tie estas la sinjoro. 2 Serĉu ĉiutage la vizaĝojn de l' sanktuloj, por ke vi ekriposu en iliaj paroloj. 3 Ne faru skismon, sed pacigu la batalantojn: juste juĝu, ne prenu la vizaĝon por juĝi pri malbonaĵoj. 4 Ne dubadu, ĉu jes aŭ ĉu ne. 5 Ne por prenado etendu la manojn, retirante ilin de donado. 6 Se vi laborakiras ion per viaj manoj, donu el ĝi por liberiĝo el viaj pekoj. 7 Ne

prokrastu doni, nek grumblu donante: vi ja scias, kiu estas la bela rekompenco por via kontribuo. 8 Ne forpuŝu la senhavulon, komuna igu ĉion kun via frato kaj nenion nomu «propra». Se vi ja komune partoprenas en la senmortaĵoj, kiom pli do en la mortemaĵoj? 9 Ne levu vian manon for de via filo aŭ de via filino, sed instruu al ili ekde junaĝo timon je Dio. 10 Ne akre ordonu al via sklavo aŭ sklavino, esperantaj je la sama Dio, por ke ili ne ĉesu timi je Dio, kiu estas super ili kaj vi; ĉar li ne venas voki laŭ la vizaĝo, sed tiujn, kiujn la spirito pretigis. 11 Kaj vi sklavoj, submetu vin al viaj sinjoroj kiel al la bildo de Dio, en respekto kaj timo. 12. Malamegu ĉiun hipokritecon kaj ĉion, kio ne estas agrabla al la sinjoro. 13 Ne forlasu la ordonojn de l' sinjoro, gardu tion, kion vi ricevis, nenion aldonante nek forprenante. 14 En la eklezio konfesu viajn pekojn kaj ne proksimiĝu al la preĝo kun malbona konscienco. Tiu ĉi estas la vojo de la vivo.

**5** 1 Sed la vojo de la morto estas jena: tutunue ĝi estas malbona, kaj je malbeno plena: murdoj, adultoj, deziregoj, malĉastecoj, ŝteloj, idolkultoj, magiado, sorĉumoj, raboj, mis-atestoj, hipokritecoj, du-koreco, ruzo, trokuraĝo, malkuraĝo, memkontenteco, akaparemo, diboĉo, envio, senprudento, altosento, fanfaronado, sentimo. 2 Persekutantoj de bonuloj, malamantaj la veron, mensogamantaj, ne konantaj la rekompencon de justeco, ne gluiĝantaj al la bono nek al juĝo justa, maldormaj ne por la bono sed por la malo! Malproksimege de ili estas mildeco kaj pacienco; ili frivolecon amegas, venĝemaj, senkompataj al almozulo, sen afliktiĝo pro l' turmentato, nekonantaj sian Kreinton, murdantoj de infanoj, koruptantoj de l' modlaĝo de Dio, repuŝantoj de l' bezonulo, turmentantoj de l' sufokato, defendantoj de l' riĉuloj, kontraŭjustaj juĝistoj pri malriĉuloj, ĉiuepekuloj: – Gardu vin, infanoj, kontraŭ tiuj ĉiuj!

**6** 1 Atentu por ke neniu vin devojigu de tiu ĉi vojo de l' instruo, kiam iu vin instruas ekster Dio. 2 Ĉar se vi povas porti la tutan jugon de l' Sinjoro, vi estos perfekta; sed se vi ne povos, faru kion vi povas. 3 Rilate al manĝo (-reguloj): kiom vi povas, plenumu ĝin: nepre abstinu de idoloferitaĝo, ĉar tio estas kulto al mortaj Dioj.

**7** <sup>1</sup><sup>3</sup> Pri la bapto, tiel vi baptu: antaŭe diru ĉion ĉi; poste baptu al la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la sankta Spirito en akvo viva. 2 Sed se vi ne havas akvon vivan, baptu en alian akvon; se ne eblas en malvarma, do en varma. 3 Sed se ambaŭ vi ne havas, elverŝu sur la kapon trifoje akvon je la nomo de Patro kaj Filo kaj sankta Spirito. 4 Kaj antaŭ la bapto la baptono kaj la baptoto fastu kaj se eble kelkaj aliaj; vi ordonu la baptonon fasti unu aŭ du tagojn.

**8** <sup>1</sup><sup>4</sup> Viaj fastoj ne estu kune kun la hipokrituloj. Ili fastas ja je l' dua kaj kvina tago de l' semajno. Sed vi fastu je l' kvara kaj je l' prepartago.

2 Kaj vi ne preĝu kiel la hipokrituloj, sed kiel ordonis la Sinjoro en sia evangelio, tiel vi preĝu<sup>5</sup>: Patro nia en la ĉielo, estu sanktigita via nomo, venu via reĝeco, fariĝu via volo, kiel en ĉielo, ankaŭ sur tero; nian panon porvivan donu al ni hodiaŭ kaj pardonu al ni nian kulpon, kiel ankaŭ ni pardonas al la kulpantoj je ni, kaj ne enkonduku nin en tenton sed liberigu nin el la malbono, ĉar viaj estas la forto kaj la gloro en la tempegojn.

3 Trifoje tage vi tiel preĝu.

---

<sup>3</sup> El *Ĉap. 7* montriĝas ke la antaŭaj estis *preparaj al la bapto*. Rilate al la uzotaj vortoj jene: oni baptu *al* la nomo de la Patro kaj de la filo kaj de la sankta spirito. *Unue*: plenintence ni nepre ĉi tie ne presigas majusklojn, ĉar la tradukon ni faris por kiel eble fidele transdoni impreson de l' originalo al Greke parolantaj eksteruloj. Ke kelkaj vortoj poste iĝis kvazaŭ kliŝaj inter kristanoj, neniel influu la komprenon de ĉi teksto, ĉar ĝiatempe tiuj kliŝoj ankoraŭ ne povis esti sentataj de l' publiko, ankaŭ ne de l' novekonvertitoj. *Due*: en plejmultaj eklezioj nuntempe oni baptas «*en* la nomo de l' Patro ktp», sed fakte tiu «*en*» fontas el mistraduko en la latina «*in nomine patris ...*», dum la helena donas «*εἰς τὸ ὄνομα τοῦ πατρὸς ...*» [«*eis to ónoma tu patrós ...*»]: kiam oni estas baptata, laŭ mia kompreno, oni do estas *survojigata al Dio*. *Trie*: la akvo *viva* t. e. fluanta, nestagna (atentu la alternadon de nominativo / akuzativo: en akvo / en akvon).

<sup>4</sup> Pri fasto: oni metas propran regulon rilate fastadon kontraŭ la kutimo Juda (Judojn oni ofte nomis hipokrituloj senplie).

<sup>5</sup> La Patronian oni komparu al la teksto laŭ Mateo kaj Luko. (*Εἰς τοὺς αἰῶνας* [*eis tus ajónas*] ni tradukas per *en* la tempegojn: laŭlitere *ajon* ja ne estas eterneco, malgraŭ ke kutime nune oni tiel tradukas).



**9**<sup>6</sup> Kaj pri la dankdiro tiel vi danku: 2 unue pri la pokalo: Ni dankdiras al vi, Patro nia, pro la sankta vito de Davido via sklavo, kiun vi konigis al ni per Jesuo via sklavo: al vi la gloro en la tempegojn. 3 Kaj pri la rompitaĵo: Ni dankdiras al vi, Patro nia, pro la vivo kaj la kono, kiun vi konigis al ni per Jesuo via sklavo: al vi la gloro en la tempegojn. 4 Kiel tiu ĉi rompitaĵo<sup>7</sup> antaŭe troviĝis dise tra la montoj kaj, kunigite, unuiĝis, tiel ankaŭ via eklezio estu kunigita el la limoj de l' tero en vian Regnon: ĉar Via estas la gloro kaj la forto per Jesuo Kristo en la tempegojn. 5 Neniu manĝu nek trinku el via dankdiro krom la baptitoj je la nomo de l' Sinjoro: ĉar ja pri tio diris la Sinjoro: ne donu la sanktaĵon al la hundoj.

**10**<sup>1</sup> Kaj kiam vi estas sataj, tiel vi dankdiru: 2 Ni dankdiras al Vi, Patro sankta, pro via sankta nomo kiun vi enloĝigis en niajn korojn kaj pro la kono kaj fido kaj senmorteco kiun vi konigis al ni per Jesuo via sklavo: al Vi la gloro en la tempegojn. 3 Vi, reganto ĉiodisponanta, kreis ĉion pro via nomo, manĝon kaj trinkon vi donis al la homoj en ĝuon, por ke ili dankdiru al Vi, kaj al ni Vi donacis spiritan manĝon kaj trinkon kaj vivon tempegan per Via sklavo. 4 Antaŭ ĉio ni dankdiras al Vi, ĉar Vi estas multpova: al Vi la gloro en la tempegojn. 5 Memoru, Sinjoro, vian eklezion, ke Vi liberigu ĝin el ĉiu malbono kaj ke Vi perfektigu ĝin en Via amo kaj kunigu ĝin de la kvar ventoj, sanktigitan, en Vian regnon, kiun Vi preparis por ĝi: ĉar Via estas la forto kaj la gloro en la tempegojn. 6 Venu la graco kaj forpasu ĉi tiu kosmo. Hosanna al la Dio de Davido. Se iu estas sankta, li proksimiĝu: se iu ne estas, li konvertiĝu. Maranatha. Amen. 7 Al la profetoj ordonu dankdiri, kion ili deziras.

---

<sup>6</sup> Pri la Sankta Manĝo (Dankdiro/Eŭĥaristio). Por ni nunuloj strangas, ke oni ekas per la pokalo anstataŭ kiel nun per la pano (kiu – parenteze – estas nomata rompitaĵo). Ankaŭ strange impresas, ke la viton oni nomas sankta de Davido, la sklavo de Dio, kaj ke nur poste Jesuon oni mencias kvazaŭ transdonanton.

<sup>7</sup> t. e. de la pano.

**11** 1<sup>8</sup> Ĉiu do, kiu venas instrui al vi tion ĉi ĉion, lin akceptu. 2 Sed se la instruanto mem, devojiĝinte, instruas alian instruon por via malkonstruo, ne aŭskultu lin. Sed se (li instruas) por kreskigo de justeco kaj kono de l' Sinjoro, vi akceptu lin kiel sinjoron. 3 Pri la apostoloj kaj profetoj, laŭ la instruo de l' evangelio vi tiel agu: 4 ĉiu apostolo, kiu venas al vi, akceptiĝu kiel la Sinjoro; 5 sed li ne restu (krom) unu tagon; sed se necese, ankaŭ duan; sed se li restas tri tagojn, li estas pseŭdoprofeto. 6 Kaj forirante la apostolo ne kunportu ion krom pano ĝis kie li tranoktos; se li petas monon, li estas pseŭdoprofeto. 7 Kaj neniun profeton parolantan en spirito vi elprovu aŭ juĝu: ĉar ĉiu peko estos pardonita, sed ĉi tiu peko ne estos pardonita. 8 Ne ĉiu parolanto en spirito estas profeto sed nur se li havas la kutimojn de l' Sinjoro. Do laŭ la kutimoj distingiĝas la pseŭdoprofeto kaj la profeto. 9 Kaj ĉiu profeto, kiu en spirito starigas tablon, ne manĝas de ĝi; sed se alie, li estas pseŭdoprofeto. 10 Kaj ĉiu profeto, kiu instruas la veron, – kiam li ne agas laŭ sia instruo, estas pseŭdoprofeto. 11 Sed ĉiu profeto, kiu jam pruviĝis vera kaj kiu ekagadas por la monda mistero de l' eklezio, ne instruante, ke oni ankaŭ faru tion, kion li faras, ne estu juĝata de vi: ĉar ĉe Dio li havas la juĝon: ĉar tiel same ankaŭ agis la praaĵ profetoj. 12 Sed kiu diras en spirito: Donu monon al mi aŭ ion tian, ne aŭskultu tiun. Sed se li diras, ke oni donu al aliaj, al bezonuloj, tiam neniun lin juĝu.

---

<sup>8</sup> Ĉap. 11: pri apostoloj kaj profetoj. En la praeklezio profetoj estis tre gravaj: tion oni povas traseri en tiu ĉi *Didaĥeo*, sed same montriĝas el la epistoloj de Paŭlo: da ili estis multaj, kiuj vagis tra la landoj. Nu, la *Didaĥeo* donas konsilojn por distingi verajn disde falsaj. (Sed atentu: 11: 7 – neniun profeton ... vi elprovu ...). Profetoj kaj profetinoj oftis do tiutempe; ili parolis «en spirito» (Paŭlo diras «en lingvoj/langoj») kaj ili dankdiris ĉe l' Sankta Manĝo (*Didaĥeo* 10: 7), ili foje petis monon por bezonuloj (*Didaĥeo* 11: 12). Sed kion celas 11:11 – profeto kiu ekagadas por la monda mistero de l' eklezio? Ni tradukis plejlaŭlitere: ni *supozas*, ke temas pri profeto, kiu ne plu parolas sanktebalbute en spirito, sed kiu ekagadis tute konkrete por problemaĵoj en la mondo, do ŝajne forlasante la sanktecan regionon: sed fakte estas nura supozo nia. Profetinojn oni ankaŭ trovas en la Nova Testamento, ekzemple en Agoj (la filinoj de Filipo) kaj ĉe Paŭlo: profetinoj kovrusian kapon profetante. Sed tio ĉi estas nun iom flanke.

**12** 1 Ĉiu, kiu venas en nomo de l' Sinjoro, akceptiĝu; ekzameninte lin, vi lin konos, ĉar komprenon vi havos fundan<sup>9</sup>. 2 Se li kiu venas, estas survoje, helpu lin, kiom vi povas; li ne restas ĉe vi krom du aŭ tri tagojn, se necese. 3 Kaj se li volas establi sin ĉe vi, estante manlaborulo, li laboru kaj manĝu; 4 sed se li ne havis fakon, vi zorgu pri li laŭ via bontrovo, por ke ĉe vi ne loĝu kristano senlabora. 5 Sed kiu tiel agi ne volas, estas kristokolportisto: atentu kontraŭ tiaj!

**13** 1 Ĉiu profeto vera, kiu deziras establiĝi ĉe vi, meritas sian manĝon. 2 Tiel same instruisto vera meritas, kiel la laborulo, sian manĝon. 3 Ĉiun unuaaĵon de l' produktoj de lano kaj draŝejo, de bovoj kaj de ŝafoj, vi prenu; kaj la unuaaĵon vi donu al la profetoj: tiuj ja estas viaj ĉefpastroj. 4 Kaj se vi ne havas profeton, vi donu al la malriĉuloj. 5 Kaj se vi faras panon, prenu la unuaaĵon kaj donu laŭ la ordono. 6 Kaj tiel same, barelon de vino aŭ oleo malferminte, la unuaaĵon prenu kaj donu al la profetoj. 7 Kaj de mono kaj de vestaĵoj kaj de ĉia posedaĵo vi prenu la unuaaĵon, laŭ via juĝo kaj donu laŭ la ordono.

**14** 1 Ĉiun dimanĉon de l' Sinjoro vi kunvenu<sup>10</sup>, rompu la panon kaj dankdiru, antaŭe eldirinte la pekojn viajn, por ke pura estu via ofero. 2 Ĉiu, kiu havas malpacon kun sia kamarado, ne kuniĝu kun vi, ĝis ili repaciĝis, por ke via ofero ne profaniĝu. 3 Tiu ĉi ja estas la diraĵo de l' Sinjoro: En ĉiu loko kaj tempo proponi al Mi oferon puran; ĉar Reĝo granda Mi estas, diras la Sinjoro, kaj Mia nomo estas admirinda por la popoloj.

---

<sup>9</sup> «komprenon ... fundan»: iom libera traduko; fakte estas komprenon ... dekstran kaj maldekstran.

<sup>10</sup> Ĉap. 14: reguloj pri la dimanĉo.

**15** 1 Manleve elektu inspektantojn<sup>11</sup> al vi mem, kaj servantojn, dignajn je l' Sinjoro, homojn mildajn kaj ne-monamikajn kaj veremajn kaj aprobitajn: por vi ili ja servos la servadon de l' profetoj kaj instruistoj. 2 Ne malestimu ilin: ili ja estas la honoratoj inter vi, kun la profetoj kaj instruistoj. 3 Admonu vin reciproke, ne en kolerego, sed en paco, kiel ĝin vi havas en la evangelio; kaj ĉiun, kiu misrilatas al iu alia, neniue alparolu nek aŭskultu, ĝis li reĝustigōs. 4 Kaj ĉiujn preĝojn kaj almozojn kaj ĉiujn agojn vi tiel faru, kiel vi trovas en la evangelio de via Sinjoro.

**16** 1<sup>12</sup> Gardu pri via vivo: viaj lanternoj ne estingiĝu kaj viaj koksoj ne senzoniĝu, sed vi estu pretaj; ĉar vi ja ne konas la horon, en kiu venos via Sinjoro. 2 Ofte vi kunvenu, serĉante tion, kio konvenas al viaj spiritoj; ĉar neniom utilos vin la tuta tempo de via fidado, se vi ne estos perfektaj en la lasta momento. 3 Ĉar en la lastaj tagoj obliĝos la pseŭdoprofetoj kaj la koruptantoj, kaj la ŝafoj ŝanĝiĝos en lupojn, kaj la amo ŝanĝiĝos en malamon; 4 dum la senjusteco kreskos, ili sin intermalamos, kaj persekutos kaj perfidos sin reciproke, kaj tiam aperos la monduŝanto kiel filo de Dio, kaj li faros signojn kaj miraklojn, kaj la tero transdoniĝos en liajn manojn, kaj li faros krimojn, kiuj neniam ankoraŭ estiĝis ekde tempegoj. 5 Tiam venos la kreo de l' homoj en la provofajron kaj skandaliĝos multaj kaj pereos, sed kiuj restas en la fido, tiuj saviĝos de l' malbeno. 6 Kaj tiam aperos la signoj de la vero: unue la signo de l' malfermo de la ĉielo; poste la signo de l' voĉo de milittrumpeto; kaj trie de l' ekstaro de la mortintoj; 7 ja ne de ĉiuj, sed kiel dirite: Venos la Sinjoro kaj ĉiuj sanktuloj kun Li. 8 Tiam la mondo vidos la Sinjoron veni sur la nuboj de la ĉielo.

---

<sup>11</sup> Elekto de «inspektantoj» (episkopoj), do iasence plireguliĝas la eklezia vivo. Ili konsideriĝas estimindaj, *ĉar* ili faras, kion faras profetoj. La profetoj do ŝajne estas pli gravaj. Tiu ĉi montras tre fruan stadion en la eklezia historio: jam en la pseŭdopaŭlaj leteroj al Timoteo kaj Tito (en Nova Testamento) la episkopoj estas sufiĉe forte establitaj.

<sup>12</sup> Lasta admono kaj apoteozo.